

*Honoron al la sublimulo, al la dignulo, al la
ĝuste kaj tute vekiĝinta.*

Suttanipāta 4:

Atthakavagga

en esperanto

el la budhisma palia kanono

El la palia tradukis kaj komentis:
Gunnar Gällmo

© Gunnar Gällmo 2016

Eldonita de la tradukinto tra lulu.com

Pliaj ekzempleroj de la libro mendeblas ĉe
<http://www.lulu.com/gunnargallmo>

Per Lulu eldoniĝis ankaŭ

Suttanipāta 1: Uragavagga

Suttanipāta 2: Culavagga

Suttanipāta 3: Mahāvagga

Khuddakapātha – la mallonga teksto

kaj ĉe Eldona Societo Esperanto

La Dharmo-pado

Enhavo

Enkonduko de la tradukinto 5

1. La sutro pri ĝuado (*Kāmasutta*) 8
2. La kavernosutro (*Guha.t.thakasutta*) 10
3. La sutro pri malbono (*Du.t.tha.t.thakasutta*)
12
4. La sutro pri pureco (*Suddha.t.thakasutta*) 14
5. La sutro pri la ĉefa (*Parama.t.thakasutta*) 16
6. La aĝosutro (*Jarāsutta*) 18
7. La sutro pri Tissamettejja (*Tissametteyyasutta*)
21
8. La sutro pri Pasura (*Pasūrasutta*) 25
9. La sutro pri Magandija (*Magandiyasutta*) 28
10. La sutro pri la disfalo de la korpo
(*Purābhedasutta*) 32
11. La kverelsutro (*Kalahavivādasutta*) 36
12. La sutro pri la malgranda kolekto
(*Cū.labyūhasutta*) 40
13. La sutro pri la granda kolekto
(*Mahābyūhasutta*) 45
14. La rapidecosutro (*Tuva.takasutta*) 50
15. La perfortosutro (*Attada.n.dasutta*) 55
16. La sutro de Sariputro (*Sāriputtasutta*) 60

Enkonduko de la tradukinto

La palia Tripitako (*Tipi.taka*) estas la plej malnova el la konataj kanonaj budhismaj tekstaroj. Ĝi konsistas, kiel indikas ĝia nomo, el tri pitakoj (palie *pi.taka*, laŭlitere "korbo"):

1. La pitako de la disciplino (*Vinayapi.taka*), kiu enhavas – krom bibliografion pri la Budho – ĉefe la regulojn pri la vivo de bhikŝuoj kaj bhikŝuinoj (t. e. la budhismaj gemonahoj).

2. La pitako de la sutroj (*Suttapi.taka*), kun la paroladoj de la Budho kaj liaj ĉefaj personaj disĉiploj. (Bonvolu noti ke la difino en PIV de "suro" kovras nur la hinduan uzon de tiu termino, ne la budhisman.)

3. La pitako de la pura dharmo (*Abhidhammapi.taka*), kun detala pritrakto de la budhisma psikologio, priskribata en seka stilo sen la literaturaj ornamoj de la du unuaj pitakoj.

La sutropitako siavice konsistas el kvin ĉefaj partoj:

1. La kolekto de longaj sutroj (*Dīghanikāya*), entute 34.

2. La kolekto de mezlongaj sutroj (*Majjihmanikāya*), entute 152.

3. La kolekto de grupigitaj sutroj (*Sa.myuttanikāya*), entute 2889 malpli longaj tekstoj, laŭteme aranĝitaj en 56 subkolektojn.

4. La kolekto de numeritaj sutroj (*Anguttaranikāya*), entute almenaŭ 2308, aranĝitaj en 11 subkolektojn, el kiuj la unua temas pri aferoj de kiuj ekzistas nur unu en ĉiu kategorio, la dua pri aferoj de kiuj ekzistas du en ĉiu kategorio kaj tiel plu.

5. La kolekto de mallongaj sutroj (*Khuddakanikāya*), malpli kohera aro de pli memstaraj tekstoj, el kiuj *Suttanipāta* estas la kvina.

Suttanipāta siavice estas dividita en kvin ĉapitroj (*vagga*). Ĉi tiu libro enhavas la duan, *A.t.thakavagga* ("La okera ĉapitro").

La tuta palia Tripitako – ampleksa kiel ĉirkaŭ 11-foje la kristana biblio – originis kiel

literaturo buŝa. Laŭ la klasika tradicio oni recitis, redaktis kaj parkerigis ĝin dum pluraj sinsekvaj koncilioj (palie *sangāyana*), el kiuj la unua tuj post la morto de la Budho, la dua cent jarojn poste kaj la tria dum la tempo de la imperiestro Asoko. Tiuj tri okazis en Hindio, kaj la tria fine aldonis la lastan parton de la Ahidhammapi.taka. Dum la kvara koncilio, en Cejlono en la unua jarcento antaŭ Kristo, oni fine fiksis la tekston ankaŭ skribe, sur palmfolioj. Du plujaj koncilioj okazis en moderna tempo en Birmo: la kvina en Mandalay en 1870 kaj la sesa en Rangunon en 1956.

Dum la lasta, oni decidis aldoni al Khuddakanikāya la ĝis tiam dum pli ol dumil jaroj plej aĝan post-kanonan pali-tekston, ekde nun do kanona: *Milinda-pañhā* ("La demandoj de Milinda").

En la strofonombro, la unua numero estas tiu de la respektiva strofo en la unuopa sutro, la dua tiu en la tuta Suttanipāta. Mi sekvas la nombradon en la reta eldono de *Vipassana Research Institute* (VRI) ĉe <http://tipitaka.org/>; kelkaj aliaj eldonoj nombras la strofojn alimaniere.

La sutro pri ĝuado

(Kāmasutta)

01 (772) Se ĝuado venas al tiu kiu deziras ĝin
kaj se li sukcesas kiam li provas,
tiam li vere ĝojas.

La mortonto ekhavis kion li deziras.

02 (773) Se por tiu kiu ĝuon deziras,
por tiu kiu el deziro naskiĝis,
tiuj ĝuoj malgrandiĝas,
tiam li suferas kvazaŭ trafita de sago.

03 (774) Kiu evitas ĝuojn,
kiel piede la serpentokapon,
tiu konscie venkas
tiun deziron en la mondo.

04 (775) Agroj, aĵoj aŭ oro,
sklavoj kaj servistoj,
virinoj, parencoj multspecaj –
la homo kiu deziras tiujn

05 (776) estas venkata de malfortaj deziroj,
frakasata de tiuj danĝeroj.

Lin sekvas nekontentigo
kiel frakasitan ŝipon plenigas akvo.

06 (777) Tial oni, ĉiam konscia,
evitu ĝuojn.
Rezigninte ilin transpasu la riveron,
kvazaŭ senakviginte boaton, kaj atingu la alian
bordon!

La kavernosutro

(Guha.t.thakasutta)

01 (778) Estaĵo en sia kaverno, tre ornamita,
homo mergita en tio kio stultigas,
fore de izoleco, tia li estas.

Ĝuojn en la mondo oni ne facile rezignas.

02 (779) Kiuj bazas sin sur deziroj, ligas sin per
agrablaĵoj de estiĝo –
malfacile estas por ili liberiĝi, kaj aliaj ne povas
liberigi ilin.

Onton kaj inton ili sopiras.

Tiujn ĝuojn kaj antaŭajn ili deziras.

03 (780) Kiuj avidas ĝuojn, kiuj sin kroĉas,
konfuzaj –

ne eblas ilin instrui, fiksitaj en la malvera.

Ne kontentigitaj, ili lamentas:

"Kio okazas al ni post nia forpaso?"

04 (781) Tial estaĵo ĉi tie ekzercu sin
scii kio en la mondo estas falsa.

Tial li ne iru falsan vojon.

Mallonga vere estas la vivo, diras la saĝaj.

05 (782) Mi vidas, tremantajn en la mondo,
la estaĵojn irintajn al tiuj ekzistoj de la soifo.
Malnobluloj lamentas en la buŝo de la morto,
ne liberaj de soifo al ĉiuspecaj iĝoj.

06 (783) Vidu ilin, tremantajn en la miismo,
kiel fiŝojn en sekigita fluo kun ete da akvo!
Vidinte tion, oni vagadu senmeme,
sen kroĉi sin al la iĝoj.

07 (784) Deziron al ambaŭ celoj oni lasu,
oni ekkonu la tuŝon, nenkon deziru.
Kion oni mem mallaŭdas, tion oni ne faru.
Tiam la saĝulon ne makulas la vidita kaj aŭdata.

08 (785) Kiam la silentulo ekkonis la
sensimpresojn kaj venkis la fluon,
inter posedaĵoj ne malpurigita,
tiam li vagadas kun la sago eltirita, zorgema,
dezirante nek ĉi tiun mondon nek alian.

La sutro pri malbono

(Du.t.tha.t.thakasutta)

01 (786) Kelkaj parolas kun malica intenco,
aliaj diras tion kion ili opinias vera.

Kiam vortobatalo ekas, tiam la silentulo ne
eniras.

Tial la silentulo neniam estas perturbata.

02 (787) Kiel oni povas venki proprajn opiniojn,
regata de deziro, cele al ĝuado?

Mem li kredas sin esti perfekta
kaj diras kion ajn li volas.

03 (788) Kiu informas aliajn pri sia alta moralo,
ne demandita,

tiun la spertuloj nomas malnobla
kiu mem parolas pri si mem.

04 (789) Bhikŝuo kiu atingis kvietecon, kun
trankvila menso,

kiu vere ne fanfaronas pri sia moralo,
lin la spertuloj nomas nobla.

Li ne fieras pri io ajn en la mondo.

05 (790) Kies doktrinoj estas elpensitaj kaj
kunmetitaj,
laŭdataj sed malpuraj,
ĉar li rigardas sin mem laŭdinda,
dependas de malstabila paco.

06 (791) Ne facilas venki la dogmemon,
doktrinojn nur post esplorado akcepti.
Tial oni inter tiuj penskutimoj
rifuzas kaj akceptas kion oni volas.

07 (792) Por tiu kiu forskuis ne estas en la
mondo
io elpensita en ĉiuspecaj iĝoj.
Malveron kaj fieron forlasis tiu kiu forskuis.
Kun kiu li irus? Li ne lasas sin kapti.

08 (793) Kiu sin kroĉas, tiu eniras doktrinon
inter doktrinoj.
Kial la nesinkroĉanto dirus ion?
Nenion li akceptas kiel fakton, nenion li
ekskludas.
Ĉi tie li forskuis ĉiujn opiniojn.

La sutro pri pureco

(Suddha.t.thakasutta)

01 (794) "Mi vidas la puran, la finan, la sanan.
La vidata purigas la homon."
Se oni kredas scii ke tio estas la fina,
tiam oni kredas gajni konon vidante la puran.

02 (795) Se la homon purigas la vidata
aŭ kono liberigas lin el la nekontentiga,
tiam la renaskiton purigas io alia.
La partiano tiel montras sin inter la parolantoj.

03 (796) Ne parolis la brahmano pro alia kialo
pri pureco
en la vidata kaj aŭdata, en la morala aŭ sentata.
Sen makulo en merito kaj malbono
li ne sukcesas ĉi tie rezigni la propran.

04 (797) Kiuj lasis la antaŭan kaj apogas sin sur
io alia,
tiuj sekvas la deziron kaj ne liberiĝas el la
katenoj.

Ili kroĉas kaj malkroĉas
kiel simio malkroĉas branĉon kroĉitan.

05 (798) Kiu akceptas ritajn devojn,
tiu iras supren kaj suben, regata de la
sensimpresoj.
Kiam la saĝulo per scio komprenis la dharmon,
tiam la tre saĝa ne iras supren aŭ suben.

06 (799) Inter ĉiuj aĵoj li estas libera de
malamikeco,
ĉu vidataj, aŭdataj aŭ sentataj.
Vidante tion kaj vagante malkaŝe,
al kio en ĉi tiu mondo li povas ligi sin?

07 (800) Ili ne cerbumas, ili ne sopiras,
ili ne parolas pri perfekta pureco.
Malliginte sin el la forta kateno de kroĉiĝo
ili deziras nenion en la mondo.

08 (801) Kiam brahmano transiris la limon
li ne prenas kion li eksciis aŭ ekvidis.
Nek kiam plena de pasio, nek kiam senpasia,
li ĉi tie povas preni ion pli altan.

La sutro pri la ĉefa

(Parama.t.thakasutta)

01 (802) Li rigardas sian propran opinion kiel la ĉefan.

Kion ajn iu povas fari en la mondo krom tio,
"pli aĉa ol ĉi tio estas ĉio alia," li diras.
Tial li ne levas sin super vortbataloj.

02 (803) Vidante sin mem laŭdinda
en la vidata kaj aŭdata, en la morala aŭ konata,
li kroĉas sin al tio.
Li rigardas ĉion alian kiel malpli valoran.

03 (804) Ĝuste tion la lertuloj nomas katenon,
kaj kiu dependas de ĝi, tiu vidas ĉion alian kiel
malpli valora.
Tial bhikŝuo ne apogu sin
al la vidata kaj aŭdata, la sentata aŭ ritoj.

04 (805) Dogmon en la mondo oni ne fondu
sur kono aŭ sur ritoj.

Oni ne prezentu sin kiel samnivela,
ne pensu pri si mem kiel pli aŭ malpli bona.

05 (806) La supozitan li lasas, ne prenas,
la konojn li ne fidas.
Li ne aliĝas al malvera doktrino,
li ne bazas sin sur iuj dogmoj.

06 (807) Kiu ne ĉi tie strebas al iu el la du celoj,
kiu ne volas iĝi en ĉi tiu mondo aŭ aliaj –
al nenio li sin kroĉas
por inter la doktrinoj elekti kaj forĵeti.

07 (808) Tial por li en la vidata, aŭdata kaj
sentata
ne estas io elpensita, ne fortaj estas liaj ideoj.
Tiu brahmano ne akceptas iun dogmon.
Al kio en ĉi tiu mondo li povas sin kroĉi?

08 (809) Ili ne cerbumas, ili ne sopiras,
ili ne akceptas doktrinojn.
La brahmano ne lasas sin konduki per ritoj.
Atinginte la alian bordon, li ne revenas.

La aĝosutro

(Jarāsutta)

01 (810) Mallonga estas ĉi tiu vivo.
Ene de cent jaroj oni mortas.
Kiu vivas pli longe,
tiu mortas pro aĝo.

02 (811) Homoj funebras kion ili amas.
Nenio posedata daŭras.
Plena je disigoj estas la vivo.
Vidinte tion, oni ne vivu en domo.

03 (812) Per la morto malaperas tio
kion homo kredas esti sia.
Komprenante tion
saĝulo ne rigardu ion kiel sian propran.

04 (813) Kiel la vekiĝinto ne vidas
tiun kiun li renkontis en la sonĝo,
tiel li ankaŭ ne vidas
la karan mortintan, forpasintan.

05 (814) Vidataj kaj aŭdataj estas tiuj

kaj iliaj nomoj elparolataj.
Nur la nomo restas
kiam homo mortis.

06 (815) Ĉagrenon, lamentadon kaj avidon
ne forlasas tiuj, kiuj kroĉas sin al la amata.
Tial la silentuloj lasas siajn posedaĵojn
kaj vagadas rigardante la trankvilecon.

07 (816) Se bhikskxuo vaganta sola
amas akcepti la solecon,
oni diras ke por li estas bone
ne plu esti vidata en la mondo.

08 (817) Ĉie la silentulo apogas sin sur nenio,
faras nek karan nek malkaran.
Sur li ne fiksiĝas lamentado kaj avido
kiel akvo ne fiksiĝas sur folio.

09 (818) Kiel guto ne fiksiĝas al lotusfolio
aŭ akvo al lotusofloro,
tiel la silentulon ne malpurigas
la vidata, aŭdata aŭ sentata.

10 (819) Tial la purigito imagas nenion
en la vidata, aŭdata aŭ sentata

kaj ne deziras purecon tra io alia.
Li sentas nek deziron nek malinklinon.

La sutro pri Tissamettejja

(Tissametteyyasutta)

01 (820) "Kiu dedixas sin al seksumado" –
tiel la respektinda Tissa Mettejja –
"diru al ni kio okazos al li!
Auxskultinte vian instruadon
ni ekzercos nin en aparteco."

02 (821) "Kiu dedixas sin al seksumado" –
tiel la sublimulo al Mettejja –
"tiu forgesas la instruadon
aux eniras malgxustan vojon.
Tio por li estas malnobla.

03 (822) Kiu antaŭe vagadis sola
sed poste dedixis sin al seksumado,
tiu similas ak sxanceligxanta veturilo en la
mondo.
Oni nomas lin malsupera mondfano.

04 (823) Kiu antaŭe havis bonan famon
perdas tiun.
Vidinte tion, li ekzercu sin
rezigni seksumadon.

05 (824) Lin superregas pensoj,
li cerbumadas kiel cxifonulo.
Auxdinte mallauxdon de aliaj
li cxagrenigxas pro tio.

06 (825) Tiam li faras glavojn,
instigata de la vortoj de aliaj.
Forta igxas lia deziro
kaj li kaptigxas en mensogoj.

07 (826) Konata kiel sagxulo
kaj solvaganto
li dedicxas sin al seksumado.
Tiam la stultulo havos problemojn.

08 (827) Koninte tiun dangxeron
la sagxulo cxi tie, kaj antauxe kaj poste,
vagadu decideme sola.
Ne dedicxu vin al seksumado!

09 (828) Ekzercu vin aparte!
Jen la plej alta por la nobluloj.
Ne tial imagu vin supera.
Tiam vi estas proksima al nirvano.

10 (829) La malplene vagantan silentulon,
kiu ne zorgas pri gxuoj
kaj transiris la riveron,
envisas la de gxuoj katenitaj."

La sutro pri Pasura

(Pasūrasutta)

01 (830) "Jen pureco," ili diras.
"En aliaj doktrinoj ne estas pureco," ili diras.
Pri kio ili dependas, tion ili nomas bona.
Inter diversaj veroj, ili atentas nenium.

02 (831) Parolemaj ili iras al kunveno
kaj nomas unu la alian frenezulo,
citas aŭtoritatojn kaj kverelas,
alstrebas laŭdon per ruzaj vortoj.

03 (832) Ligita al vortbatalo, meze en la
kunveno,
li deziras laŭdon, timas malvenkon.
Pruvite malprava li konfuziĝas.
Pro mallaŭdo li koleras, serĉas la malfortan
punkton de la aliulo.

04 (833) Ili diris ke lia parolado havas mankojn,
tiam li estis malpruvata de la
demandoekzamenantoj.

La malsupera instruisto lamentas kaj plendas.
"Ili venkis min," li ploras.

05 (834) Tiuj kvereloj naskiĝas ĉe ŝramanoj.
Tie oni venkas kaj malvenkas.
Vidinte tion, oni ne plu kverelu.
Oni ja gajnas nur laŭdon.

06 (835) Laŭdata li tiam estos,
prezentinte sian opinion en la kunveno.
Li ridas kaj fanfaronas pri tio
kiam okazis laŭ lia volo.

07 (836) Lia fiero kaŭzas al li zorgojn.
Ĉiajn malmodestecojn li esprimas.
Vidinte tion, oni ne kverelu.
La spertuloj diras ke tio ne kondukas al pureco.

08 (837) Kiel heroo, nutrita de reĝa manĝado,
blekante iras renkonte al sia malamiko,
tiel rapidu, ho heroo, same tien!
Antaŭ tio ne okazos batalo.

09 (838) Kiuj akceptis opinion kaj kverelas
kaj diras: "Ĝuste ĉi tio estas vera!" –
parolu kun ili! Ne havas vi
kontraŭulon en tiu disputo.

10 (839) Sed tiuj kiuj vagadas sen armiloj,
ne baritaj de tiu aŭ alia opinio,
kion vi gajnu ĉe ili, Pasura?
Ili ĉi tie ne gajnis ion superan.

11 (840) Tiam vi venis, cerbumante,
pensante pri ĉiuj teorioj,
per pureco ligita al la renkonto,
sed vi ne povos iri plu.

La sutro pri Magandija

(Magandiyasutta)

01 (841) "Ankaŭ vidinte Soifon, Malkontenton
kaj Deziron
mi ne ekdeziris seksumadon.
Kial do mi eĉ piede
volus tuŝi tion, plenan de urino kaj fekaĵo?"

02 (842) "Se vi ne volas havi tian juvelon,
virinon deziratan de multaj reĝoj,
do diru vian vivkomprenon, viajn ritojn, vian
vivtenadon?
Kiun renaskiĝon vi serĉas?"

03 (843) "Tion mi diras: ne, mi ne povas" –
tiel la sublimulo al Magandija –
"inter doktrinoj elekti kaj neglekti.
Vidante kaj ne akceptante iun opinionon
mi sentas internan pacon."

04 (844) "Ekkoninte la teoriojn" –
tiel Magandija –
"vi diras, ho silentulo, ke vi akceptas nenium,
ke via celo estas interna paco.
Kiel la saĝuloj klarigas tion?"

05 (845) "Ne per opinioj, ne per konoj, ne per
scioj" –
tiel la sublimulo al Magandija –
"nek per ritoj oni laŭdire puriĝas,
nek per ne-opinioj, ne-konoj, ne-scioj,
ne-ritoj aŭ ne-moralo.
Lasinte tiujn kaj ne preninte ilin
oni serĉas pacon, ne iĝon.

06 (846) "Se do ne per opinioj, ne per konoj, ne
per scioj" –
tiel Magandija –
"nek per ritoj oni laŭdire puriĝas,
nek per ne-opinioj, ne-konoj, ne-scioj,
ne-ritoj aŭ ne-moralo.
tiam mi trovas tiun instruon konfuza.
Kelkaj puriĝas per opinioj."

07 (847) "Vi apogis vin sur la vidata kaj
demandis" –
tiel la sublimulo al Magandija –
"kaj konfuziĝis inter ĉio kiun vi prenis.
El ĉi tie vi ne vidas subtilajn ideojn.
Tial vi trovas tion konfuza.

08 (848) 'Same bona', 'pli bona', 'malpli bona' –
kiu pensas tiel, tiu tial ekkverelas.
Kiam iu ne ekŝanceliĝas pro tiuj tri,
tiam por li nenio estas 'same bona' aŭ 'pli bona'.

09 (849) Kial tiu brahmano dirus: 'Jen vero'?
Aŭ kial li asertus: 'Jen mensogo'?
Ĉe kiu ne estas io simila aŭ malsimila,
kial li komencus disputi?

10 (850) Lasinte la hejmon, vagante senhejme
silentulo ne interrilatas kun vilaĝanoj.
Malplena je ĝuoj, libera je sopiro,
li ne ekkverelas kun homoj.

11 (851) La eminentulo, kiu vagadas sola en la

mondo,
ne akceptu kaj parolu pri tio.
Kiel en akvo naskitan, dornohavan lotuson
ne malpurigas la akvo,
tiel la silentulon, pledantan por paco, liberan de
deziro,
ne malpurigu la ĝuo kaj la mondo.

12 (852) Scianto ne iĝas fiero pro opinioj aŭ
perceptoj.
Ne tia li estas.
Li ne lasas sin gvidi de farato aŭ aŭdato.
Li ne lasas sin enfermiĝi.

13 (853) Por tiu kiu liberigis sin de ideoj ne
estas katenoj
Kiun liberigis saĝo, tiu ne trompas sin mem.
Kiu kroĉas sin al ideoj kaj opinioj,
tiuj vagadas en la mondo kaj prezentas
kontraŭdirojn."

La sutro pri la disfalo de la korpo

(Purābhedasutta)

01 (854) "Kiel vidas, kiel sin kondukas
tiu kiun oni nomas trankviliĝinta?
Diru tion al mi, ho Gotama,
kiam mi demandis, pri la plej alta homo."

02 (855) "Libera de soifo post disfalo de la
korpo" –
tiel la sublimulo –
"ne apogante sin sur into kaj onto,
ne bazante sin sur la mezo,
oni atendas nenion.

03 (856) Sen kolero, sen timo,
sen fanfaronado, sen pento,
saĝe parolanta, ne fiera –
tiu silentulo bridas sian paroladon.

04 (857) Li ne kroĉas sin al la estonto.
Li ne funebras la pasintecon.

Li vivas aparte inter la tuŝoj.
Li ne lasas sin konduki inter opinioj.

05 (858) Ne trudiĝema, ne perfida,
ne avida, ne envia,
ne sentakta, ne malestima,
li ne kalumniadas.

06 (859) Inter agrablaĵoj libera de ebrio,
ne katenita de fiero,
milda kaj saĝa,
ne kredema, ne indiferenta.

07 (860) Li ne ekzercas sin por profito.
Lin ne skuas perdoj.
Ne katenita de soifo
li ne ĉasas gustojn.

08 (861) Ĉiam en ekvilibro kaj atenta
li en la mondo ne rigardas sin same bona,
nek pli bona, nek malpli.
Ĉe li ne estas fiero.

09 (862) Kiu dependas de nenio,
kiu komprenis la dharmon kaj estas libera –
pri iĝo kaj maliĝo
tiu ne soifas.

10 (863) Tiun mi nomas trankviligita
kiu ne zorgas pri ĝuoj.
Katenojn li ne havas.
Li iris trans la deziroj.

11 (864) Li ne havas filojn, nek gebovojn,
nek agrojn kaj kampojn.
Nenio prenita aŭ forĵetita
troveblas ĉe li.

12 (865) Kion la mondidoj diras pri li,
kaj ŝramanoj kaj brahmanoj –
pri tio li ne zorgas.
Tia babilado ne tuŝas lin.

13 (866) Sen deziro, sen envio,
la silentulo ne rigardas sin supera,

ne samniveĉa, ne suba.
La sentempulo ne eniras la tempon.

14 (867) Kiu ne havas ion propran en la mondo,
ne malĝojas ĉar io ne ekzistas,
kaj ne vagadas inter la doktrinoj –
lin oni nomas trankvila.

La kverelsutro

(Kalahavivādasutta)

01 (868) "De kie venas ĉiuj kvereloj, de kie venas ĉiu bruo, ĉiu lamento, ĉagreno kaj envio? Ĉiaspeca malmodesteco kaj klaĉado, de kie ili venas? Diru do!"

02 (869) "El la kara venas ĉiuj kvereloj, venas ĉiu bruo, ĉiu lamento, ĉagreno kaj envio, ĉiuspeca tromemfido kaj klaĉado. Ligitaj al envio estas kvereloj kaj bruo. El la bruo naskiĝas la klaĉado."

03 (870) "Sur kio restas la kara en la mondo kaj la deziroj disvastigataj en la mondo? Sur kio restas la deziroj kaj ilia plenumo, kiu kondukas al la celo de la homo?"

04 (871) "Sur avido restas la kara en la mondo kaj la deziroj disvastigataj en la mondo."

Sur tio restas la deziroj kaj ilia plenumo,
kiu kondukas al la celo de la homo."

05 (872) "Sur kio restas la avido en la mondo?
De kie venas teorioj,
kolero, mensogoj kaj duboj
kaj la aferoj pri kiuj la ŝramano parolis?"

06 (873) "Kion oni nomas agrabla kaj
malagrabla en la mondo,
proksime al tio ekestas la avido.
Vidinte inter la formoj neniigon kaj ekeston
oni kreas teorion en la mondo.

07 (874) Kolero, mensogoj kaj duboj
estas en ambaŭ.
La dubanto ekzercu sin sur la konovojo,
ekkoninte la aferojn kiujn la ŝramano klarigis."

08 (875) "Sur kio restas la agrabla kaj la
malagrabla?
Kio ne estu por ke ili ne estu?
Neniigo kaj ekesto – kio estas?
Diru al mi sur kio ili restas!"

09 (876) "Sur tuŝo restas la agrabla kaj la malagrabla.

Tuŝo ne estu por ke ili ne estu.

Neniigo kaj ekesto – tio estas.

Mi diras ke sur tio ili restas."

10 (877) "Sur kio restas tuŝo en la mondo?

De kie venas la kroĉado?

Kio ne estu por ke mi ne havu ion propran?

Kiam kio malaperos, tuŝoj ne tuŝos?"

11 (878) "De menso kaj korpo dependas la tuŝo.

Sur sopiro restas la kroĉoj.

Kiam sopiro ne estas, mi ne havas ion propran.

Kiam la korpo malaperos, tuŝoj ne tuŝos."

12 (879) "Kunlige al kio la korpo ne plu estos?

Kiel feliĉo kaj nekontentigo ne plu estos?

Diru al mi kiel ĝi ne plu estos.

Tion mi dezirus ke ni sciu."

13 (880) "Ne konscia pri la konscio, ne konscia pri la nekonscio,

nek nekonscia, ne konscia pri la ĉeso –
kunlige al tio la korpo ne plu estos.
Baroj kaj diverseco restas sur la konscio."

14 (881) "Kion ni demandis al vi, tion vi diris al
ni.

Ion alian ni demandos. Do diru!
Ĉu ne kelkaj saĝuloj ĉi tie diras
ke plej alta estas la purigo de la menso,
aŭ ĉu ili diras ke estas io alia?"

15 (882) "Kelkaj saĝuloj ankaŭ diras ĉi tie
ke plej alta estas la purigo de la menso,
sed kelkaj diras ke estas la ĉeso,
diras tion elokvente kiam nenio restas.

16 (883) Kiam la silentulo ekkonis tiujn kaj
fidas ilin,
ekkonis ilin kaj faras ilin bazo, tiam li
ekzamenas ilin.
Ekkoninte ilin li liberigis sin kaj ne ekkverelas.
Al ĉi tiu mondo aŭ aliaj la saĝulo ne iras."

La sutro pri la malgranda kolekto

(*Cū.labyūhasutta*)

01 (884) "Ĉiu tenas sin al sia propra opinio kaj ekkverelas elokvente pri tio kaj ĉi tio. 'Kiu konas ĉi tiun doktrinon, tiu trovos. Kiu mokas ĉi tion, tiu ne tute evoluigis.'

02 (885) Tiel kverelinte, ili disputas kaj diras: 'La alia estas frenezulo, sentaŭgulo.' Kiu el tiuj diras la veron? Ĉu ili ĉiuj parolas bone?"

03 (886) "Se tiu, kiu ne samopinias pri la doktrino de alia, estas fia frenezulo kaj ne tre saĝa, tiam ĉiuj estas frenezuloj kaj ne tre saĝaj. Ĉiuj tenas sin al sia propra opinio.

04 (887) Kaj se ili fakte estas puraj de monda profitemo, puraj en saĝeco, spertaj kaj zorgemaj,

tiam al ili ne mankas saĝeco,
ĉar iliaj opinioj estas same perfektaj.

05 (888) Tion mi ne nomas vero
kion frenezuloj diras unu al la alia.
Ĉiu faris el sia propra opinio veron.
Tial ili nomas unu la alian frenezulo."

06 (889) "Kion kelkaj nomas vera, ne falsa,
tion aliaj nomas vanaj vortoj kaj mensogoj.
Tiel kverelinte, ili disputas.
Kial la ŝramanoj ne diras nur unu aferon?"

07 (890) "Unu vero ekzistas, ne dua
pri kiu unu povas kvereli kun alia.
Tion kaj ĉi tion ili proklamas kiel propran veron.
Tial la ŝramanoj ne diras nur unu aferon."

08 (891) "Kial ili diras tion kaj ĉi tion kiel veron
kverelante elokvente pri tio?
Ĉu oni aŭdis multajn verojn pri tio kaj ĉi tio,
aŭ ĉu ili nur fendas harojn?"

09 (892) "Ne estas multaj veroj pri tio kaj ĉi tio,
krom enpense, konstantaj en la mondo.
Harojn ili fendas, prezentante siajn opiniojn.
El du aferoj ili nomas unun vero kaj la alian
mensogo.

10 (893) Kiam ili en la vidita kaj aŭdita, en la
morala aŭ konata
akceptis tiujn kaj montras al ili malestimon,
tiam ili prezentas sian teorion kaj ridas,
dirante: 'La alia estas frenezulo, sentaŭgulo.'

11 (894) Li rigardas la alian kiel frenezan
kaj nomas sin mem sperta.
Li mem asertas ke li estas sperta.
La alian li malestimas. Tion li montras.

12 (895) Li troigas siajn opiniojn
kaj senmezure fieras.
Li rigardas sin mem princo
kaj sian opinion perfekta.

13 (896) Se la parolo de la alia estas sensignifa,

tiam ankaŭ lia saĝo estas sensignifa.
Se la saĝulo mem atingis la plej altan scion,
tiam ne estas frenezulo inter la ŝramanoj.

14 (897) 'Kiuĵ ĉi tie proklamas alian doktrinon,
al ili mankas pureco kaj ili ne perfektigis' –
tiel la sektanoj interkverelas.
Ilin instigas deziro al ĉimonda profito.

15 (898) 'Jen pureco,' ili diras.
'En aliaj doktrinoj ne estas pureco,' ili diras.
Tiel la sektanoj metas siajn opiniojn unu kontraŭ
la alia
kaj diras emfaze sian propran opinion.

16 (899) Emfaze li diras sian propran opinion.
Jen li rigardas la alian frenezulo.
Mem li ekkverelas,
nomas la alian frenezulo kun malpura doktrino.

17 (900) Tiam li prezentas sian teorion kun si
mem kiel mezuro.
Alte li starigas sin en la mondo kaj ekkverelas.

Lasinte ĉiujn teoriojn
li ne plu kverelas en la mondo."

La sutro pri la granda kolekto

(Mahābyūhasutta)

01 (901) "Ĉiuj tiuj tenas sin al sia propra opinio.
'Ĝuste ĉi tio estas vero,' ili kverelas.
Ĉu ili ĉiuj do estas riproĉataj?
Ĉu ili ĉiuj do meritas laŭdon?"

02 (902) Malmulte estas, ne sufiĉe por trankvilo,
la fruktoj kiam du kverelas, mi diras.
Vidinte tion, oni ne kverelu.
Sekurecoprotektado estas bazo de konkordo.

03 (903) Kiuj ajn kutimaj opinioj ekzistas,
ĉiujn tiujn la saĝulo ne laŭdas.
Ĉu la nedependulo enirus la dependecon?
Ĉu li en la vidata kaj aŭdata ne ekzercu
paciencon?"

04 (904) 'La plej altan moralon ili atingas per
memkontrolo,' ili diras.
'Puriginte la ritojn, ili atingas la celon.
Ĉi tie ni volas ekzerci nin kaj atingi purecon,
enirinte la bonan iĝon.'

05 (905) Se li malobeas siajn regulojn
li timas esti farinta eraron.
Li deziras kaj sopiras purecon
kiel tiu kiu, for de sia hejmo, foriris de la
karavano.

06 (906) Rezniginte ĉiujn ritojn,
ne agante en maniero evitebla,
ne sopirante la puran kaj malpuran
oni rezignu ĉion kaj ne sin kroĉu al paco.

07 (907) Helpe de la malamata
aŭ de la vidata, aŭdata aŭ sentata
ili plendas laŭte, ĉasante purecon,
ne liberaj de soifo al ĉiuspecaj iĝoj.

08 (908) Kiu sopiras la deziratan
aŭ avidatan, tiu faras siajn planojn;
sed se por iu ne estas morto kaj renaskiĝo,
kial tiu tremus? Kion li sopirus?"

09 (909) "La doktrino laŭ kelkaj plej alta
estas laŭ aliaj malpli bona.
Kiu el tiuj diras la veron?
Ĉu ili ĉiuj parolas bone?"

10 (910) La propran doktrinion ili nomis perfekta,
tiun de aliaj malpli bona.
Tiel ili disputas kaj kverelas.
Ĉiu nomis sian propran vera."

11 (911) "Se doktrino de aliaj iĝus aĉa pro
malestimo,
tiam inter doktrinoj neniu estus pli bona.
Multaj nomas doktrinojn de aliaj malaltnivelaj,
sed la propran plena de forto.

12 (912) Ne tiel ili honoras la veran instruon
kiel ili laŭdas siajn proprajn vojojn.
Ĉiu parolo tiam iĝus vera,
sed ne ĉio parolata estas pura.

13 (913) Brahmanon ne gvidas aliaj
inter instruoj elekti.
Tial li levas sin super kvereloj.
Li ne rigardas alian instruon kiel plej bonan.

14 (914) 'Mi scias, mi vidas – tiel estas
tutsimple.'
Kelkaj kredas sin povi purigi per opinioj.
Se oni mem vidis ion per tio

kaj troigis, oni diras ke pureco estis atingata per
iu alia.

15 (915) La vidanto rigardas la sensojn kaj la
korpon.

Vidinte ilin, li ekkonos ilin.

Se la spertuloj ĉi tie volas vidi multon aŭ
malmulton,

ne tial ili diras ke tio estas pureco.

16 (916) Kiu parolas kun troa konvinko, tiu ne
estas facile instruebla.

Memfaritan opinion li honoras.

Se li dependas de io, li nomas tion bona.

Kion li vidis, tion li nomas pura.

17 (917) La brahmano ne ligeblas al la tempo,
ne kroĉas sin al opinioj, ne kontentigas sin per
scio.

Ekkoninte la kutimajn opiniojn,

li rigardas nur tion al kio aliaj sin kroĉas.

18 (918) Kiam la silentulo liberigis sin el
katenoj en ĉi tiu mondo,

ne ekestas bruo el malvera instruo.

Trankvila inter maltrankvilaj li estas en
ekvilibro.

Li ne prenas tion, kion prenas aliaj.

19 (919) Antaŭajn pasiojn li lasis, novajn ne
kultivas,
deziron ne sekvas, nek parolas kun troa
konvinko.

La saĝulo liberigis sin de opinioj.

Ne fiksigas en la mondo tiu, kiu ne riproĉas sin
mem.

20 (920) Inter ĉiuj aĵoj li estas libera de
malamikeco,

ĉu vidataj, aŭdataj aŭ sentataj.

Li formetis la ŝarĝon, silentas, liberas,
ne estas ligata al la tempo, ne sopiras."

La rapidecosutro

(Tuva.takasutta)

01 (921) "Mi demandas vin, ho sunparenco,
aparta, iranta pacovojon, granda saĝulo:
Kiel bhikŝuo vidu por estingiĝi,
por ne kroĉi sin al io ajn en la mondo?"

02 (922) "Rigardinte la radikon kaj la baron" –
tiel la sublimulo –
"li tute ĉesu pensi: 'Mi estas saĝa.'
Kiun ajn soifon li havas en si,
li ĉiam konscie ekzercu sin agi bone.

03 (923) Kiun ajn staton li sentas ĉi tie,
ĉu interna ĉu ekstera,
li ne fieru pri tio.
Tion bonuloj ne nomas trankvilo.

04 (924) Pli bona oni tial ne rigardu sin,
nek malpli bona aŭ same bona.
Tuŝata de multaj formoj
oni ne kroĉu sin al fiero.

05 (925) En sia interno, bhikŝuo trankviligu sin
kaj serĉu pacon, ne de alia.
Ĉe tiu, kies interno trankviliĝis,
nenio akceptendas, nenio forĵetendas.

06 (926) Kiel meze en granda akvo
ondo ne naskiĝas, nur ekstaras,
tiel staru bhikŝuo, libera de deziro,
kaj nenie emfaze montru sin."

07 (927) "Vi parolis, ho klarvidanto.
Vi spertis la instruon kaj venkis la danĝeron.
Do montru al ni la vojon, honorinda,
de la regularo kaj de la koncentrado!"

08 (928) "Per la okuloj oni ne dediĉu sin al
avareco,
al vilaĝa klaĉado oni fermu la orelojn,
gustojn oni ne deziru,
kaj oni ne ligu sin al io en la mondo.

09 (929) Kiam tuŝata
bhikŝuo ne plendu ie ajn,

ne volu iĝi,
ne estu skuata de tio, kio timigas.

10 (930) Rizo, trinkaĵoj,
manĝaĵoj kaj vestoj –
ricevinte tiujn, oni ne amasigu ilin,
nek mantrankviliĝu ne ricevinte ilin.

11 (931) Bhikŝuo meditu, ne estu nenifaranto,
ne plu agu malĝuste,
kaj elektu liton kaj seĝon
en loko kun malmulte da bruoj.

12 (932) Li ne tro dormu
sed diligente strebu.
Pigrecon, falsecon, ridadon kaj ludadon
kaj seksumon li lasu, same ornamaĵojn.

13 (933) Pri magio, sonĝoj kaj signoj
la miaj ne zorgu, nek steloj,
bestaj blekoj, sanigo
aŭ fekundigo de virinoj.

14 (934) Mallaŭdo ne timigu bhikŝuon,
laŭdo ne fierigu lin.
Avidon kaj envion,
koleron kaj kalumnion li forpelu.

15 (935) Bhikŝuo ne aĉetu kaj vendu,
ne trovu ie mankojn,
en vilaĝo ne koleriĝu,
por profito ne babilu.

16 (936) Bhikŝuo ne fanfaronu
aŭ parolu ruze,
ne sin trudu
aŭ partoprenu en kverelo.

17 (937) Li ne mensogu,
ne intence trompu.
Pro vivmaniero, saĝo aŭ ritoj
li ne malestimu iun.

18 (938) Kiam ofendito aŭdis multan babiladon
de ŝramanoj aŭ de mondinfanoj,

tiam li ne respondu akre.
Pacemuloj ne venĝas.

19 (939) Kompreninte ĉi tiun instruon
kaj ekzameninte ĝin, bhikŝuo ĉiam ekzercu sin
atente.

Kompreninte ke estingo estas paco
li ne malakceptu la instruon de Gotamo.

20 (940) Li ja venkas, ne estas venkata,
vidis la instruon, ne nur aŭdis.

Tial li en la instruado de la sublimulo
ĉiam zorge ekzercu sin kaj honoru ĝin.

La perfortosutro

(Attada.n.dasutta)

01 (941) Vidu la timon kreitan de perfortulo,
vidu kiel homoj batalas!,
Mi parolos pri la ekscitiĝo
kiel ĝi tremigas min.

02 (942) Vidinte homojn barakti
kiel fiŝoj en malalta akvo
kaj interbatali
mi ektimis.

03 (943) La mondo ne havas kernon.
Ĉiudirekten ĝi movas sin.
Mi deziris loĝejon
sed vidis neniun ne jam loĝatan.

04 (944) Fine batalojn
mi vidis, min plenigis antipatio.
Tiam ĉi tie sagon mi vidis,
malfacile videblan, ligitan al la koro.

05 (945) Trafitoj de sagoj
kuras ĉiudirekten.
Eltirinte la sagon
oni ne kuras, oni ne sinkas.

06 (946) Kaj sekvas la ekzercreguloj:

Kio en la mondo sklavigas,
ne ligu vin al tio!
Oni traboru la ĝuon,
ekzercu sin por atingi nirvanon.

07 (947) Vereca la silentulo estu, ne trudema,
honestaj kaj libera de klaĉado.
Libera de kolero li venku
deziron al malbono kaj avidon.

08 (948) Dormon kaj pigron oni venku, kaj
inerton,
kaj ne vivu neglekte.
Oni ne estu fiera
direktante la menson al nirvano.

09 (949) Li ne mensogu,
ne deziru formojn.
Ekkoninte sian fieron
li rezignu perforton.

10 (950) Pri la malnova li ne ĝoju,
pri la nova ne paciencu.
Oni ne ploru pri la estinto,
ne ligu sin al la nuboj.

11 (951) Avidon mi nomas granda rivero,
deziron mi nomas torento,
kroĉadon mi nomas ĉagreno.
La marĉon de ĝuo oni malfacile transiras.

12 (952) La silentulo ne devias de la vero.
Sur seka tero staras la brahmano.
Rezigninte ĉion
li nomiĝas paca.

13 (953) Li estas vere saĝa, atingis la plej altan
scion,
ekkoninte la instruon, ne apogante sin sur io.

Ĝuste li vagadas en la mondo
kaj ĉi tie envas neniun.

14 (954) Kiu ĉi tie transpasis la ĝuojn,
baron en la mondo malfacile venkeblan,
tiu ne funebras, ne maltrankvilas,
la fluon li haltigis, katenojn li ne havas.

15 (955) Kiu pli frue velkigis tion,
pli poste li nenion prenu.
Se li inter tiuj nenion prenas
li trankvile vagadas.

16 (956) Kiu nenie en la menso kaj la korpo
posedas ion karan
kaj ne priploras tion kiu ne ekzistas,
tiu perdas nenion en la mondo.

17 (957) Kiu ne diras: "Ĉi tio estas mia,"
aŭ: "Ĉi tio apartenas al aliaj,"
kiu ne trovas ke io apartenas al li –
tiu ne priploras: "Tio ne estas mia."

18 (958) Kiu ne estas malmola, ne avida,
libera de deziro, ĉie senpartieca –
tiun mi deklaras laŭdinda,
se oni demandas min, la neŝanceblan.

19 (959) Kiu estas libera de deziro kaj klare
komprenas,
tiu kolektas nenion.
Li rezignas ĉiun strebadon.
Trankvilon li vidas ĉie.

20 (960) Ne samnivela, ne suba,
ne supera rigardas sin la silentulo.
Paca li estas, sen envio,
ne prenas, ne forĵetas.

La sutro de Sariputro

(Sāriputtasutta)

01 (961) "Mi ne vidis tion antaŭe" –
tiel la respektinda Sariputta –
"aŭ aŭdis de iu,
instruiston kiu parolas tiel bone,
venintan el Tusita kun multaj sekvantoj.

02 (962) Kiel la klarvidanto rigardas
la mondon kun ĝiaj devaĵoj,
dispelinte ĉiun mallumon,
li sola trovis la feliĉon.

03 (963) Tiu vekiginto, tiel libera de deziro
kaj honesta, veninta kun multaj sekvantoj –
al li mi venis kun demando
el la multaj ĉi tie ligitaj.

04 (964) Al bhikŝuo ne plu ĝuema,
irinta al malplena sidejo,
al arbradiko aŭ tombejo
aŭ al montokavernoj,

05 (965) sur litoj altaj kaj malaltaj,
kiom da teruraĵoj ne estas tie,
kiuj ne tremigu la bhikŝuon
ĉe liaj trankvilaj lito kaj seĝo?

06 (966) Kiom da danĝeroj en la mondo
por tiu, kiu iras kien li ne iris,
kiujn la bhikŝuo povas venki
ĉe siaj solecaj lito kaj seĝo?

07 (967) Kion li diru?
Kio estu lia agadkampo?
Kiujn ritojn li faru,
la decidema bhikŝuo?

08 (968) Kiun ekzercon li faru,
koncentrita, saĝa kaj atenta,
por – kiel forĝisto arĝenton –
purigi sin mem?"

09 (969) "Kio estas agrabla al tiu kiu ne plu
emas" –
tiel la sublimulo al Sariputta –

"kaj kiu uzas malplenajn seĝon kaj liton,
kiu vere ĝuas la plej altan vekigon –
tion mi klarigas al vi, kiel mi komprenas.

10 (970) Kvin hororojn la saĝulo ne timu,
la atenta bhikŝuo kiu bridas sin:
tabanojn, kulojn kaj serpentojn,
kontaktojn kun homoj kaj kvarpieduloj.

11 (971) Ne lin ĝenu sekvantoj de aliaj
doktrinoj,
kiam li vidis multajn timigaĵojn ĉe ili.
Danĝerojn venontajn li eltenu
dum li alstrebas la ĝustan.

12 (972) Se turmentata de malsano aŭ malsato,
malvarmo aŭ varmego, li eltenu tion.
Turmentata de tiaĵoj multmaniere, senhejma,
li strebu forte.

13 (973) Li ne ŝtelu, li ne mensogu,
kun ĉion ampleksanta amo li tuŝu timemajn kaj
sentimajn.

La maltrankvilon en sia menso
li forigu, ligitan al la nigra.

14 (974) Lin ne regu kolero kaj fiero.
Fosinte ilian radikon, li staru.
Poste kaj karan kaj malkaran
li venku ĝis sia vivfino.

15 (975) Honorante la saĝecon en nobla ĝojo
li venku tiujn danĝerojn,
venku la antipation en sia soleca kuŝejo,
venku la kvar kialojn plendi:

16 (976) 'Kion mi manĝu?' aŭ 'kie mi manĝu?',
'malbone mi dormis', 'kie mi dormos ĉinokte?'
Plendinte pri tio, la strebanto
ĉesu plendi kaj vagadu senhejme.

17 (977) Ricevinta manĝon kaj vestojn
ĝustatempe
li estu modera por iĝi kontenta.
Protektata en tio, sin reganta en la vilaĝo,
li ne parolu severe se ofendata.

18 (978) Kun rigardo mallecita, ne ŝanceliĝanta,
profunde koncentrita, tute veka,
kun la menso en ekvilibro kaj atenta
li haltigu dubon kaj maltrankvilon.

19 (979) Riproĉite, li atente ĝoju,
kun purvivantuloj rompu la barojn.
Lerte li parolu, kaj ne tro.
Pri klaĉado li ne zorgu.

20 (980) Kaj estas en la mondo kvin malpuraĵoj
kiujn la atentulo ekzercu sin por forigi.
Inter formoj, sonoj kaj gustoj,
odoroj kaj tuŝoj oni venku la deziron.

21 (981) Inter tiuj aĵoj lasinte la deziron,
la atenta bhikŝuo kun bone liberigita menso
ĝuste kaj ĝustatempe ekzameni la instruon.
Koncentrita, li forigu la mallumon."